PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Jara abonkotizo

30,-- GM

================

Kun germana
Eldono 40,--GM

================

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 2/1976 - 9 jan 1976
Aperas ĉiusemajne

## Germana Esperanto-Ekspozicio Augsburg 1976

Augsburg (pp) - Sub la honora protektado de la ĉefurbestro de la urbo Augsburg okazos de la 24-a de aprilo ĝis la 9-a de majo 1976 la "Germana Esperanto-Ekspozicio Augsburg 1976".

Respondeca organizanto estas Esperantogrupo Augsburg sub gvido de Hermann Schmid. Por priparoli la preparojn la esperantistoj de Augsburg kaj ĉirkaŭaĵo kunvenis dimanĉe la 4-an de januaro.

La aranĝo kaj preparo de la ekspozicio mem okazos de Esperanto-Inform-Centro Nürnberg, sub gvido de Ludwig Pickel, kiu ankaŭ prizorgos la ekspozicion dum la ekspozicia daŭro.

La oficiala inaŭguro okazos sabate, la 24-an de aprilo 1976 en la urbodomo de Augsburg, kie la ekspozicio havos lokon. La kultura referato de la urbo senpage disponigos la teretaĝan halon de la urbodomo.

Lige kun la ekspozicio okazos diversaj Esperanto-aranĝoj, kiel bavara Esperanto-tago, kultura Esperanto-aranĝo k.a. La organizanto kaj aranĝanto jam nun invitas ĉiujn esperantistojn el Germanujo, speciale el Bavario, kaj ankaŭ el eksterlando.

Interesuloj turnu sin al la loka organizanto: Hermann Schmid, Alte Reichsstrasse 31 f, D-8901 Steppach, telefono 08 21/48 81 49.

Pro aferoj, kiuj koncernas la ekspozician materialon ktp., oni turnu sin al: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Telefono 09 11/ 46 36 49.

La ekspozicio kaj la ĉi-rilataj aranĝoj kostas multe da mono. Oni esperas ricevi subvenciojn de la urbo Augsburg kaj de aliaj instancoj. Esperantistoj, kiuj volas finance kontribui por la sukcesigo de la ekspozicio, estas petataj ĝiri siajn kontribuojn al jena konto: Hermann Schmid, 8901 Steppach, Kreissparkasse Augsburg 340 497 aŭ al Ludwig Pickel, 85 Nürnberg, Postscheckkonto Nürnberg 2144 96-855. Antaŭdankon!

## Kongreso de jugoslaviaj esperantistoj

Zagrebo (pp) - Laŭ decido de Jugoslavia Esperanto-Ligo dum la kunveno okazinta en Zagrebo la 13-an de decembro, la 20-a Kongreso de jugoslaviaj esperantistoj okazos en Prilep de la 28-a ĝis la 30-a de julio 1976. La kongreson preparos la Esperanto-societo "La Prospero", kiu jam faris necesajn preparlaborojn. La pasinta landa kongreso okazis en Niŝ en 1970; sekve por la nuna kongreso kaj kongresurbo regas granda intereso. Ĉar Prilep kuŝas survoje al Ateno kaj la kongreso okazos du tagojn antaŭ la Universala Kongreso, certe partoprenos ĝin ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Prilep havas 60 000 loĝantojn kaj estas la plej Esperanta urbo en Jugoslavio laŭ ĝia ekstera aspekto: Monumento al Zamenhof en la urbocentro, kliniko "Dro Zamenhof", restoracio "Esperanto" ktp.

Loĝeblecoj estos en hotelo kaj studenta domo laŭ moderaj prezoj. Informojn petu de "La Progreso", P.F. 35, YU-97500 Prilep, Jugoslavio. (mĝ)

**Voĉo el Bona Espero**

Bona Espero (pp) - Nur lasttempe la esperantistoj en la tuta mondo eksciis pli detale kaj pli ofte ion pri la ekzisto de "Bona Espero, kie oni laboras sub la signo de Esperanto". Tiu informfluo ŝuldiĝas al la novaj loĝantoj de Bona Espero, ges-roj Grattapaglia kaj speciale al ilia pasintjara vojaĝo tra Eŭropo. Por kontentigi plian inform-deziron kaj teni kontakton kun la amikoj de Bona Espero tra la tuta mondo, aperis la unua bultenletero kun la titolo "Voĉo el Bona Espero". Ĝi enhavas fotojn, tekston de Giuseppe Grattapaglia,kaj ĝin aranĝis kaj presis Torben Kehlet, Danlando.

El tiu bultenletero ni citas:

"Karaj geamikoj de Bona Espero

Post reveno el Eŭropo, multaj gesamideanoj skribis al ni petante pliajn informojn pri nia vivo ĉi tie kaj esprimante la deziron kores-pondadi kun niaj infanoj.
Tiu invado de eksterlanda korespondaĵo en regionon, kie malmultaj ho-moj skribas kaj ricevas leterojn, forte impresis la respondeculojn de la loka poŝta servo kaj instigis ilin plibonigi la servon mem. Sekve, nun ni ricevas viajn leterojn sufiĉe akurate, sed alia problemo por ni estas akurate respondi al ili!

Ja, niaj ĉiutagaj taskoj estas ĉiam tiel urĝe plenumendaj, ke ni povas dediĉi malmultan tempon al korespondado. Pro tio ni decidis sendi al vi, kune kun niaj plej varmaj bondeziroj, tiun ĉi komunan bultenleteron Ne temas do pri nova periodaĵo en Esperanto kun redakcio, seriozaj artikoloj, malmultaj abonantoj kaj multa deficito, sed pri amika le-tero adresita al tiuj personoj, kiuj esprimis amikajn sentojn al Bona Espero (BE)."

El la "Voĉo el Bona Espero" ni ekscias, ke estis resp. estas je vizi-to en Bona Espero tri esperantistoj, nome S-ro Link el Heidelberg, pri kies vizito Pilo-Press jam raportis, S-ro Kehlet el Kopenhago, kiu estante en Novjorko dum profesia vojaĝo, decidis flugi iomete suden 7000 km por propraokule vidi BE. Li faris multajn bildojn kaj prezentos ilin en Eŭropo. Li ankaŭ transprenis la taskon presigi kaj dissendi la "Voĉon el Bona Espero". La tria vizitanto estas S-ano Lesh el Gustavus en Alasko. Per aventura vojaĝo, parte fluge kaj parte ŝipe, li trairis la tutan kontinenton de nordo al sudo por res-tadi kelkajn monatojn sub la suno de BE.

Plie ni citas: "Alvenis kuracisto. Finfine oni rajtas malsaniĝi. Neniu malsaniĝis ĝis nun en BE, ĉar ne ekzistis kuracisto! Sed nun ni estas multe pli trankvilaj, ĉar nia samideano D-ro Carlos Lima Melo forlasis la komfortan vivon en Rio de Janeiro por plenumi ĉi tie veran mision. Li fariĝis oficiala kuracisto en urbeto Alto Paraiso je 18 km de BE (3000 enloĝantoj sur 2000 kv.km), sed lia famo jam tiel disvas-tiĝis post nur kelkaj monatoj, ke homoj el aliaj regionoj alfrontas longajn vojaĝojn per ĵipo kaj ĉevalo por konsulti lin. Li estas helpata de sia edzino japandevena Ŝigeko, flegistino kaj esperantistino."

La infanoj de Bona Espero

"Dum la monatoj decembro, januaro kaj februaro, la brazilaj lernejoj estas fermitaj pro la someraj ferioj. Tial, la infanoj de Bona Espero, kiuj havas parencojn en la urboj, nuntempe ferias ĉe ili, kaj restis nur kun ni la orfoj. Niaj domoj aspektas malplenaj kaj iom malpli da bruo vekas eĥojn en nia valo. Pluraj niaj geamikoj promesis sendi kristnaskajn donacetojn, kaj do atmosfero de granda atendo regas nun ĉe niaj infanoj. Por ili ni klopodas aranĝi gajan feston ke ili sentu sin en familia etoso. Kompreneble, la eventualaj donacoj adresitaj al la infanoj, kiuj nun forestas, estos disdonitaj kiam ili revenos, sed je la nomo de ĉiuj ni kore jam antaŭdankas. Kaj kun plej koraj salutoj kaj bondeziroj ni restas sincere viaj Bonesperantoj"

## Esperantisto retroiras...kiel omaro

Romo (ra-ro/pp) - Unu el la plej popularaj elsendoj de la itala radio nomiĝas "Il Gambero", nome la "Omaro", ĉar, samkiel ĉi tiu krustulo marŝas retroirante, la partoprenantoj en la elsendo ricevas, ĉe la komenco, difinitan monsumon, kiun ili malgajnas poparte, kiam ili ne kapablas respondi al demandoj pri kulturo kaj aktualaĵoj. La komenca sumo estas unu miliono da italaj liroj; je la unua malĝusta respondo oni malgajnas la duonon, nome 500 mil lirojn; je la dua malĝusta respondo, alia duono foriras, nome 250 mil liroj, kaj tiel plu. La elsendo allogas la aŭskultantojn ĝuste pro ĉi tiu meĥanismo, ĉar la homa naturo estas tia, ke ofte oni iamaniere ĝojas pro la malfacilaĵoj, kiujn aliaj renkontas survoje: la afero meritus esploron el psikologia - aŭ eĉ psikiatria vidpunkto.

La redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma, d-ro Antonio De Salvo, post severa selektado inter miloj da kandidatoj, ĵus registris sian partoprenon en unu el la elsendoj de la menciita programo, kiu estis aŭdebla dimanĉon la 4-an de januaro 1976, je la 13-a horo, sur la ĉefa kanalo, do en la plej favoraj tempo kaj aŭskultokondiĉoj. Respondinte al 5 el la 7 proponitaj demandoj, d-ro De Salvo retroiris nur dufoje, kaj gajnis 250 mil lirojn, proksimume 1 000 germanajn markojn, kondutante kiel la plej lerta el la tri konkursantoj. Kompreneble, kiam li prezentis sin, d-ro De Salvo menciis sian Esperanto-agadon.

## Metalskulptista ekspozcio de esperantisto

Vieno (pp) - Radio Vieno disaŭdigis la 3-an resp. 4-an de januaro 1976 felietonon de d-ro Karl Beckmann pri vere ne ĉiutageca ekspozicio speciale dediĉita al la metalskulptista verko de Walter Engelbert Kraus, kiu favoras kaj parolas la Zamenhofan lingvon jam ekde sia junaĝo.
El la felietono ni citas:

"Walter Engelbert Kraus naskiĝis en Vieno, antaŭ 60 jaroj. La unuan instigon al arta kreado li ricevis, kiel mezlernejano, de sia desegnista profesoro. Sed ĉar lia deziro, studi en la Viena Akademio de la Belaj Artoj, pruviĝis nerealigebla, li mem plukulturis siajn talentojn kaj perfektigis sin aŭtodidakte. La materian bazon li perlaboris, dume, kiel financoficisto. Baldaŭ post sia abiturienta ekzameno li estis konatiĝinta pli kaj pli intime kun Esperanto, instigate per vesperaj diskutoj, en la komuna ĉambreto, kun sia je unu jaro pli aĝa frato, la nun tre konata samideano Hugo Kraus, iniciatinto - interalie - de la Esperanto-feriumejo Primoŝten. Fascinis kaj entuziasmigis nian talentan artiston la planlingvo ĝuste ankaŭ pro tio, ke li ĉiam ŝatis fremdlingvajn studojn, jam kiel lernanto....La nuna ekspozicio prezentas 40 liajn verkaĵojn. El tiu nombro la Arthistoria Muzeo mem - ŝtata instituto! - akiris jam kvin por daŭra posedo."

## Esperanto en la radio

## Ne sufiĉa vigla korespondado

En leterkesto d-ro De Salvo, redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma i.a. diris: "Koncerne la oftecon de nia elsendo, ni devas malkaŝe diri, ke momente ni ne rajtas tion postuli, ĉar ankoraŭ ne estas sufiĉe vigla la korespondado flanke de la aŭskultantoj. Estas vere, ja, ke ĝi multe kreskis, sed ankoraŭ ni ne povas esti plene kontentaj, ĉar, se oni dividas la korespondaĵojn alvenintajn dum preskaŭ unu jaro per la nombro de niaj elsendoj, oni trovas, ke meznombre, ĉiu elsendo naskis reagon de iom pli ol 20 personoj - kaj se oni limiĝas al leteroj, kartoj kaj sonbendoj, apartigante do la presaĵojn, la reagantoj estis, meznombre, apenaŭ po 11. En tiaj kondiĉoj, oni ne povas esperi je favora akcepto de petoj de plivastigo de niaj elsendoj, se, laŭŝajne,

nur po 11 personoj en la mondo aŭskultas nian stacion! Kompreneble, ni konscias, ke la statistiko estas nekonforma al la realo, sed ni devas tion pruvi! Kaj ne povas konsoli nin la fakto, ke ankaŭ la aliaj stacioj elsendantaj en Esperanto havas korespondajn problemojn - se oni faras proporcion, kaj oni kalkulas, ke Radio Roma elsendas po 20 minutoj en ĉiu semajno, kaj Radio Varsovio po 630 minutoj, Radio Varsovio devus ricevi 18 mil korespondaĵojn!

La sola ebla penso, do, karaj geamikoj, estas ĉi tiu: se oni volas pli bonan servon, oni praktike montru, per skribado, ke la statistikoj ne konformas al la realo, kaj niaj voĉoj ne perdiĝas en la etero."

Radio Vieno. El la semajna komentario de la 3/4 jan ni citas: "Federacia kanceliero Bruno Kreisky ĉiam denove ekmajstras la politikajn situaciojn per iniciatoj, ŝajne impulsaj, en vero bone preparitaj. En la trankvila tempo inter Kristnasko kaj Novjaro li vizitis la jugoslavian ŝtatestron Tito - kio surprizis eĉ nian propran Eksterlandaferan Ministerion - por klarigi almenaŭ provizore la problemon de nia slovena minoritato en la Suda Karintio. Nun Jugoslavio ne plu opozicias la planitan "propraspecan homnombradon". Aliflanke estas tamen eble, ke tiuj slovenoj, kiuj kontraŭbatalas ĝin ankoraŭ, fiaskigos ĝin per bojkoto..." La ĉi-semajnan komentarion verkis Werner Schmidt.

Radio Zagreb. La unua elsendo de 1976 elsendis Novaĵojn el Jugoslavion, la tradician "Radian Humoraĵon" kaj la duan parton de la priparolo de ricevitaj publikaĵoj.

Svisa Kurtonda Servo. Ĉiam interesaj estas la prelegoj de d-ro A. Baur pri svisaj temoj. Ĉi-foje li rakontis pri svisa esploristo de Afriko.- Ĉu Plena gramatiko de Esperanto kaj Plena Vortaro de Esperanto kreis novan lingvan normon anstataŭante la Zamenhofan Fundamenton? Pri tiu demando prelegis ge-sroj Gacond surbaze de publikigaĵoj en Literatura Mondo.

Pekino. La elsendoj el Pekino ĉiam estas bone aŭdeblaj. La unua ĉi-jara elsendo donis retrorigardon al la jaro 1975 surbaze de ĉefartikolo en Pekina gazeto, krome muzikan programon honore al Maŭ Zedong. La pensoj kaj la spirito ĉiam estas senteblaj de Maŭ Zedong!

Radio Varsovio

La unua komentario de la jaro 1976 donis retrorigardon al la politikaj eventoj de 1975 verkitan de Witold Skrabalak, la direktoro de la Poreksterlanda Programo de Pola Radio.
La unua leterkesto donis certecon: la kosma nombro de 5000 korespondaĵoj estis atingita dum 1975. Ĝis la 31.12.75 alvenis 5 013 korespondaĵoj. La 4 999-an, la 5 000-an kaj la 5 001-an korespondaĵojn sendis Olavi Kaleva el Finnlando.
La Esperanto-Ekspreso raportis pri Zamenhof-festoj en Dortmund kaj Krakovo, aŭdigis saluton de Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, intervjuojn kun finna aŭskultantino kaj Hermann Behrmann el Paderborn, k.a. La 6-an de jan estis aŭdebla la "Trarigardo de la Esperanto-gazetaro", kiu citis Britan Esperantiston ( novembro 75), Eŭropan Esperanto-Revuon ( oktobro-novembro 75) kaj la revuon Esperanto (decembro 75). El Brita Esperantisto oni akcentis la artikolon de William Auld: Kio pli valoras: varbado de novaj esperantistoj aŭ kreado de favora publika opinio? La decembran numeron de "Esperanto" la recenzisto nomis "frandaĵo".
Plej nova informo: Laŭ la ĵusa leterkesto de Radio Varsovio (8/9.1.76) en la semajno de la 1 ĝis 7 jan eniris 277 korespondaĵoj de aŭskultantoj kun la poŝta stampo el la jaro 1975. Tiele altiĝis la nombro de korespondaĵoj por 1975 al 5 300. Cetere, ĉi tiu leterkesto estis varia, "balancita", oni aŭdis voĉojn kritikajn, konsentajn, novajn kaj malnovajn, orientajn kaj okcidentajn!